# SIGNO DE L'ESPER'

/JUBILEA KANTO/

G. F. HÄNDEL

W. G. ATKINSON




1. Jam dum jarcento vivas sur la ter', lingvo homfarita, signo de l'esper'.
Gin ne nutris forto de potenca Stat' kreskis ĝi en koro de amika frat'.
Per Esperanto daŭre strebu ni, por ke homoj vivu en fratharmoni'.

2. Nun jubileon festu ni kun ĝoj', pro atingoj jamaj sur celita voj'.
Dume ni konsciu pri ordona dev' serĉi realigon de l'komuna rev'.
Por Esperanto kune agu ni, ĝis decid' favora de la histori'.

7